

INFORMACIJE

INFORMOJ

Leto / jaro 29, št. / n-ro 2

junij / junio 2024

Uvodnik

Frontartikolo

Oni ofte aŭdas la demandon, ĉu Esperanto ankoraŭ havas signifon en la epoko de la plibonigitaj tradukhelpiloj kaj la artefarita intelekto. La respondo estas senduba: JES. Ĉar, la internacia lingvo Esperanto estas praktika kaj justa. Ĝi estas facile lernebla, ĝi estas taŭga por evoluigi kaj ekzerci la cerbon, ĝi faciligas nekomplikan tamen precizan komunikadon tutmonde. Ĝian komunikan funkcion oni povas parte anstataŭigi per modernaj teknologiaj rimedoj, kiuj tamen ne ĉiam estas al dispono pro la mizero de la eventualaj uzantoj, kurentĉeso, intenca perturbo en la komunika sistemo, milito ktp.

Ĉi ni enpaŝas en la sferon de ja justeco de Esperanto, kiu per sia ekzisto kaj agado moderigas la maljustaĵojn, premantajn la plejparton de la tutmonda homaro. Esperanto povas grandparte malaperigi la lingvan diskriminacion kaj izoladon, kiuj turmentas neprivilegiitajn personojn sen taŭga infrastrukturo kaj ekipaĵo por alnivela teknologia komunikado. Sekve validegas, ke Esperanto ankoraŭ estas bezonata, ĉar ĝi estas praktika kaj justa.

Pogosto sliŝimo vpraŝanje, ali ima esperanto ŝe smisel v ĉasu izpopolnjenih prevajalnikov in umetne inteligence. Odgovor je nedvomno: DA. Mednarodni jezik esperanto je praktičen in pravičen. Lahko je naučljiv, koristen je za razvoj in delovanje možganov, omogoča preprosto, a precizno komunikacijo po vsem svetu. Njegovo komunikacijsko funkcijo res lahko delno nadomesti moderna tehnologija, ki pa ni vedno na razpolago zaradi revščine morebitnih uporabnikov, izpadov elektrike, namernih motenj telekomunikacij, vojn itd.

Tu pa prehajamo na pravičnost esperanta, ki s svojim obstojem in uporabo blaži krivice, ki jih trpi velika večina svetovnega prebivalstva. Esperanto lahko v veliki meri odpravi jezikovno diskriminacijo in izolacijo, ki jo občutijo deprivilegirani brez ustrezne infrastrukture in opreme za visokotehnološko komuniciranje. Zato še vedno velja, da je esperanto potreben, ker je praktičen in pravičen. **O.K.**

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Dan odprtih vrat

V petek, 26. julija 2024, na Svetovni dan esperanta, vas vabimo na druženje v društvenih prostorih na Grablovičevi ulici 28 v Ljubljani.

Z informacijami in raznimi dogodki vam bomo na razpolago od 10h do 15h.

Ob 11h bo izredna skupščina ZES.

Ob 12.30 bo predstavitev slovenskega filma *Ne čakaj na maj* s podnapisi v esperantu.

Ogledali si boste lahko knjižnico esperantske literature in prodajno razstavo knjig. Na razpolago bo voden ogled knjižnice in arhiva.

Mladinski kotiček bo nudil igre in uganke.

Vmes še kakšno presenečenje kulturne narave.

Dan esperanta

26. julij 2024

Spoštovanje in pravice za vse jezike

uea Universala Esperanto-Asocio

Izredna skupščina ZES

Izredna letna skupščina Združenja za esperanto Slovenije bo **v petek, 26. julija 2024, ob 11.00 v** Ljubljani v dvorani Službe za lokalno samoupravo MOL na Grablovičevi ulici 28.

Dnevni red:

1. Odprtje skupščine in ugotovitev sklepčnosti
2. Izvolitev organov skupščine (delovnega predsednika, zapisnikarja in dveh overiteljev zapisnika)
3. Podelitev razrešnice organom preteklega mandata in izvolitev organov ZES za obdobje 2024-2026
4. Razno

Prosimo, da se skupščine zanesljivo udeležite. Če ob napovedanem času skupščina ne bo sklepčna, ker ne bo prisotna najmanj polovica članov, bo seja čez pol ure na istem mestu. Takrat bo skupščina sklepčna, če bo navzočih najmanj 10 članov (15. člen Statuta ZES).

Esperanto-konferenco Alp-Adrio 2025

La prepargrupo por la venonta 21-a Esperanto-konferenco Alp-Adrio kunvenis la 1-an de junio en Triesto en la klubejo de TEA. El Slovenujo ĉeestis Nika Rožej, kiu estas oficiala reprezentanto de SIEL en la daŭra Alp-Adria komisiono, gvidata de Edvige Ackermann Tantin, flanke de Peter Grbec kaj Ostoj Kristan. El Italujo partoprenis gemembroj de TEA kaj reprezentantoj de Parma, Udine kaj Monfalcone.



Post la sukcesa kunsido en Triesto (Foto O. K.)

La prepargrupo proponas inviti la geesperantistojn de la regiono Alp-Adrio kunveni en Nova Gorica inter la 4-a kaj la 6-a de julio 2025. La konferencon kaj la akompanajn fakajn kaj kulturajn eventojn oni enkorpiĝu en la kadron de la tutjara festivalo *Nova Gorica-Gorizia 2025, la ĉefurbo de eŭropa kulturo*. La gvidanta temo de la venonta Esperanto-konferenco estu »La landlimoj, kiuj kunligas la najbarojn«.

La prepargrupo proponis plurajn programerojn, la kunvenejon kaj eblajn eventojn por la ĝenerala publiko. La oficiala organizanto estos ES Ljubljana en proksima kunlaboro kun SIEL kaj TEA. **O.K.**

Plurlingvismo kaj Esperanto



Na pobudo vodstva Evropske esperantske unije smo dne 19. junija poslali devetim novoizvoljenim evropskim poslankam in poslancem naslednjo ĉestitko, prevedeno v slovenščino. Dobili smo tudi odgovora Matjaža Nemca in Milana Zvera, ki sta izrazila pripravljenost za sodelovanje pri zadevnih pobudah.

Letero al slovenaj eŭropaj parlamentanoj

Estimata Membro de la Eŭropa Parlamento,

Plej korajn gratulojn pro via elekto al la Eŭropa Parlamento!

En la lastatempa Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo la plej populara propono en la eduka kaj kultura sferoj estis "Eŭropo bezonas plibonigitan lingvolernadon". Malgraŭ la astronomia elspezo por la instruado de la angla dum pluraj generacioj, la rezultoj estas seniluziigaj: nur 13% de EU-civitanoj konsideras sian anglan "tre bona", kaj kiam ili alfrontas objektivan teston, kiel en SurveyLang de la Eŭropa Komisiono en 2012, nur 1% atingas la C1-nivelon, eĉ en sia unua fremda lingvo. Do ne ekzistas lingvo kiu estas bone parolata de plimulto de la EU-loĝantaro. Tio igas EU-plurlingvismon nemalhavebla por demokratio.

Por forigi tiun difekton ja ekzistas reala solvo. La Programo "Multlingva Akcelilo" de ERASMUS+ en 2018-2019 montris, ke mallongaj kursoj de Esperanto povas plibonigi lingvolernadon ĝenerale - la propedeŭtikan efikon. Bonvolu legi pli en la retpaĝo <https://lernu.net/instruado>.

Ni respekte petas vin pripensi tiujn gravajn aferojn, kontraŭbatalante lingvan hegemonion, kaj subtenante ĉiujn klopodojn por pliigi lingvan justecon en Eŭropo.

Dezirante al vi daŭran sukceson.

Janez Jug
Prezidanto de SIEL

Seán Ó Riain
Prezidanto de EEU

La biblioteko de SIEL

La ordigado de la biblioteko de SIEL proksimiĝas al la fina stadio – regula funkciado kaj de-tempo-al-tempa kompletigado. Prilaborata estas nun ankoraŭ la breto 16 kun almanaĥoj kaj kongreslibroj, kie oni esperas plurajn novajn akiraĵojn.

La 3-an de junio la freŝa katalogo datita 2024-05-26 estas retroŝte dissendita. Bonvolu noti: forigu la malnovan version de la katalogo, sed ne presu la novan, ŝirmante tiel la medion kaj ŝparante la monon. Serĉu datumojn en la elektronika dosiero, tio ja estas multe pli praktika.

Urejanje knjižnice ZES je že blizu zadnje faze, to je rednega delovanja in občasna dopolnjevanja fonda. Večjih najdb v arhivu ne pričakujemo več, je pa še nepopisanih nekaj pomebnih knjig v zasebnem varstvu oziroma že dolgo izposojenih. Le začasno urejena je ostala le še polica 16 z almanahi in kongresnimi knjigami, kjer je tudi še največ novih najdb. Tudi pri revijah bo treba še marsikaj urediti, zlasti ustrezne trajne mape ali fascikle, ki jih je težko poceni dobiti na trgu.

Katalog knjižnice z datumom 26. 5. 2024 je bil razposlan po elektronski pošti 3. junija. Kot je bilo že večkrat poudarjeno, zavržite stari katalog, a novega ne tiskajte. Čuvajte okolje, elektronska verzija pa je tudi mnogo bolj praktična za iskanje. In seveda, obiŝcite naŝo knjižnico! **O.K.**

Prodaja knjig za knjižnico Aalen

Občasno razpoŝiljanje aŝuriranega kataloga knjižnice ZES je že obrodilo nekaj sadov. Nekatero je vzpodbudilo k izposoji kakŝne knjige, tudi k osebnemu obisku. Posebej smo se razveselili povpraŝevanja iz Nemĉije. Esperantsko knjižnico v Aalenu, mestu 70 km vzhodno od Stuttgarta in 30 km severno od Ulma, je katalog vzpodbudil k nakupu veĉjega ŝtevila knjig iz naŝe zaloge ter dvojnikov rabljenih knjig. Po vskladitvi seznama in krajŝem pisnem pogajanju smo se zedinili za znesek okoli 200 EUR in ĉez nekaj dni je paket s hitro poŝto GLS sreĉno prispel k naroĉniku. Poŝiljanje knjig preko firme GLS je ugodno, ker je njihova tarifa vezana na dimenzije paketa in ne na teŝo.

Aalen je industrijsko mesto z okoli 67 tisoĉ prebivalci. Na spletu lahko veliko preberete o njem, ĉe vas pa pot zanese v bliŝino, si velja ogledati njihovo esperantsko knjižnico. Najavite se lahko po elektronski poŝti espbib@mail.de. **O.K.**

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL



ESPERANTSKO DRUŝTVO LJUBLJANA
ESPERANTO-SOCIETO LJUBLJANA

TVU in Parada uĉenja v Kranju

EDL je tudi letos sodelovala z Ljudsko univerzo Kranj pri prireditvah Tedna vseŝivljenjskega uĉenja (TVU). Poleg nekaj nastopov v ŝolah, knjižnici in avli občine je bila za javnost najbolj vidna naŝa udeleŝba na Paradi uĉenja (PU) v sredo, 22. maja. Vreme je bilo muhasto, a dovolj prijazno, da ni odgnalo obiskovalcev. Na trgu pred gledaliŝcem je bil oder za nastope in malo morje nagnetenih stojnic.

Na stojnici smo razstavili uĉbenike, slovarje, leposlovje itd., preteŝno naŝo produkcijo zadnjih let. Delili smo propagandni material, dajali pojasnila na razna vpraŝanja in vabili kroŝek ob torkih v Medgeneracijskem centru Kranj. Nekateri obiskovalci pa niso pokazali zanimanja za esperanto, rabili so le podpis za nagradno igro prireditelja ali pa so priŝli le po bonbon v koŝari na pultu.



Obiskovalce smo predvsem vabili na kroŝek v MCK (Foto O. K.)

Daniela Moĉnik in Nika Roŝej sta, ŝal med padanjem deŝja, s pomoĉjo kolegice, ki je prikazovala Nikine ilustracije k pesmi, na odru recitali

Aŝkerčevo balado *Anka / Anjo* v slovenščini in v esperantu. Dodali sta še Aŝkerčevo pesem *Preŝernu* v slovenščini. Sicer številna publika se je skrivala pred dežjem pod arkadami in stojnicami.



Recitacija Aŝkerčeve *Anke* (Foto O. K.)

Z obiskom smo bili zadovoljni, prihajali so domačini in turisti vseh starosti. Kot vedno pa je bilo največ jutranjih telovadk v oranžnih majicah in jopičih, ki po tradiciji opravijo svojih tisoč gibov na začetku prireditve.

Nika Rožej je 13. maja dopoldne ponovno obiskala Waldorfsko osnovno šolo v Naklem. Prisotnih je bilo 22 učencev. Pozdrave v esperantu, predstavljanje in predstavitev dr. Zamenhova so otroci pozorno spremljali. Tudi imena za barve v esperantu so si kar zapomnili. Še bolj zanimivo pa je bilo, ko so poslušali zgodbo o gosenci, ki jo je napisala in ilustrirala Dragica Ropret Žumer. V zgodbi so se ponovile barve in potem so otroci izbrali papir v barvi, ki jim je bila najbolj všeč.

Sledilo je malo gibanja. Ob izklicani barvi so vstali tisti otroci, ki so imeli to barvo. In ker se iz gosence razvije metulj, smo zgubali (tehnika Origami) metuljčke. Prvi metulj je nastajal bolj počasi, pri drugem pa je nekaterim že kar šlo in veselili so se, da bodo še doma lahko pokazali in delali metulje.

Ob koncu so dobili delovne liste z nekaj besedila o esperantu in slovarčkom, kjer so sami napisali imena barv, ki so se jih naučili. Tako nam je ura prav prijetno minila.



Ura esperanta v Naklem (Foto WŠ Naklo)


15. maja je v avli mestne občine Kranj potekala prireditev *Dan za krepitev zdravja*. V Medgeneracijskem centru so me povabili k sodelovanju, saj je lahko esperanto dober za vzdrževanje psihične kondicije. Imela sem tablo s slikami naše vsebine in nekaj ljudi smo nagovorili in pokazali so zanimanje za esperanto. Razstavni pano o esperantu je pritegnil tudi dekle, ki je shranilo sliko za podrobnejši ogled doma in morda za obvestilo kakšni prijatelji.



V avli Mestne občine Kranj (Foto N. R.)

Kar malo sem bila pa presenečena, da so me povabili v mestno knjižnico, kjer je bilo branje v

različnih jezikih (*Dajmo knjigi glas*). Nisem vedela, da v naši okolici živijo ljudje iz tako različnih koncev sveta. Poleg evropskih jezikov smo slišali tudi gospo iz Indonezije. Moj prispevek je bil iz knjige Tiborja Sekelja *La Papua taglibro* o njegovem obisku, ko je raziskoval, kako je Mikluho Maklaj 100 let prej kot prvi beli človek bival v vasi Bongo. Prevod je prebrala kolegica Daniela Močnik in imeli sva pozorne poslušalce.



Daniela Močnik in Nika Rožej sta v kranjski knjižnici dali esperantski knjigi glas

27. maja sem ponovila predstavitev esperanta še v podružnični OŠ Goriče, kjer so otroci (9 se jih je prijaviilo) tudi lepo sodelovali.



Nika Rožej je prava specialistka za delo z osnovnošolsko mladino, tokrat v Primskovem

Podobno je bilo na podružnični OŠ Primskovo 12. junija. Predstavitev in delavnico sem imela po rednem pouku ob 15h in sodelovalo je 8 otrok. Zgodbica o gosenci z gubanjem metulja je dobra kombinacija in za drugo leto bi si bilo dobro še kaj takega izmisliti. **N. R.**

Vesele urice v MCK

Krožek naše gorenjske sekcije se redno sestaja ob torkih v Medgeneracijskem centru Kranj. Predsednica EDL Nika Rožej pa ne prihaja samo na klepet in prigrizek ob čaju ali kakavu, ampak pripravi vedno tudi malo telovadbe za možgane. Posebej pohvalno je, da sekcija v Kranju sodeluje tudi na raznih prireditvah kulturnega ali izobraževalnega značaja na Gorenjskem. **O.K.**



Marde en la Intergeneracia centro Kranj (Foto MCK)

Prevod zdravniškega priročnika

Konec maja sta dr. Ludoviko Molnar in dr. Julianna Farkas iz madžarske sekcije Svetovne medicinske esperantske zveze UMEA preko spletišča ZES zaprosila za pomoč pri prevajanju zdravniškega priročnika *Ärztlicher Dolmetscher* v slovenščino. Ta priročnik vsebuje 271 vprašanj in sporočil, s katerimi zdravnik določi anamnezo bolnika in ga obvesti o tekočih in nadaljnih postopkih zdravljenja. Prošnjo sodelavcev UMEA sem takoj posredoval vodstvu ZES, a ker se ni nihče javil za to opravilo, sem nalogo sam prevzel v imenu Esperantskega društva Ljubljana. Lektoriranje besedila je opravila naša članica Marjana Kompelj.

Priročnik omogoča zdravniški pregled brez prisotnosti prevajalca. Priročnik v 16 večjih jezikih je na razpolago proti plačilu pri založbi Springer (<https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-662-48739-6>). Elektronska verzija stane 30 EUR.

Projekt UMEA pa zagotavlja še dodatne brezplačne prevode, dosegljive po spletu. Ti so zlasti v pomoč ukrajinskim bolnikom in ranjencem, ki rabijo v tujini zdravnika (<http://umea.fontoj.net/projektoj>). Za zdaj je na razpolago 10 dodatnih jezikov, med njimi esperanto in slovenščina. Za slovenske zdravnike

bodo posebej zanimivi že objavljeni prevodi v nizozemščino, albanščino, ukrajiniščino in slovaščino. O.K.

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



Tečaj esperanta v Mariboru

Zdenka Rojc je vabila na začetni tečaj esperanta v Dnevnom centru aktivnosti za starejše Studenci v Mariboru. Po začetnih ogledih sta ji ostali dve pridni in vztrajni učenki. Za konec šolskega leta so se vse tri odpravile na obisk esperantskemu krožku v medgeneracijskem centru v Izoli, ki ga vodi Peter Grbec. Mnogo bolj izkušena in večja skupina jih je lepo sprejela. O.K.



Renkontiĝo de kursanoj el Izola kaj Maribor

Iz dejavnosti KD SG

El la agado de KS SG

Kongres hrvaških esperantistov

Na 12. Kongres hrvaških esperantistov na otoku Prvić pri Šibeniku od 21. do 28. junija 2024 je bilo prijavljenih 85 esperantistov iz 10 držav in treh kontinentov. Iz Slovenije je bil edini udeleženec Davorin Jurač. Prvić je kongres trajal cel teden, organizatorja pa sta bila DEC iz Djurdjevca in KEL. Namestili smo se

v počivališču Požega, nekdanji tovarni ribjih konzerv. Urejeno je skromno, a nič nam ni manjkalo. Tu smo imeli polpenzion.



Parto de la partoprenantoj de la 12-a Kongreso de kroataj esperantistoj en Prvić Luka

Program kongresa je bil bolj sproščene narave, tako da je omogočal stroko in zabavo. Poleg tečaja esperanta za gimnazijce iz Zagreba je bilo več zanimivih predavanj: kako delujejo brezpilotni letalniki, predstavitev kriminalnega romana Julijana Modesta *Alina*, register hrvaških esperantistov, predstavitev monografije Josipa Pleadina *Učiteljica Antonija Jožičić*, Erasmus+ projekt *Eŭropaj horizontoj por kreski*, predstavitev knjige Tatjane Auderskaje *Nokta vojaĝo* ter letni zbor KEL.



La septaga kongreso estis kaj labora kaj amuza

Strokovno vzletni in ogledi so nas vodili na slapove Krke, na Kornate, na šibeniške otoke Zlarin, Žirje, Kaprije in Obojan, v Primošten, v spominski center Faust Vrančić v Prvić Luki in na koncert Nevena Mrzlečkega.


Kongresno knjigo, množico slik in posamezna predavanja si lahko ogledate na spletiščih DEC in KEL. **D.J.**

Komentiramo

Ni komentas

Duncan Charters

Strategia laborplanado – ĉu resumebla?



Dum niaj diskutoj pri strategiaj planoj de UEA, ofte esprimiĝis la deziro de koncizeco: eĉ, “ĉar evidentiĝis ke neniu legas 34-paĝan, eĉ 16-paĝan laborplanon, ĝi estu nepre sur unu sola paĝo!”

Por provi kontentigi

la unupaĝulojn, mi ĉi tie faras provon, malneton, por stimuli viajn reagojn. Ni efektive staras nun en la momento de kunigo de rezultoj de la dumkongresaj kaj aliforumaj diskutoj kaj enketado, por ke povu prezentiĝi nova plano antaŭ la UK okazonta en Aruŝo. Simile mallonga (1-3 paĝoj), sed kun suplementoj por konkretigi la necesajn agad-detalojn.

Vizio

Esperanto-komunumo kiu videble vivas en konkordo kun siaj idealoj kiel komunika modelo. Mondo de respekto al lingvaj rajtoj kaj diverseco de kulturoj, al kiu Esperanto kontribuas per agnoskata sukceso en antaŭenigo de interkompreniĝo celanta pacan progreson de la homaro.

Misio

Konsciigi la publikon kaj decidofarantojn pri la logiko kaj valoro de Esperanto kiel instrumento de edukado al kunlaborema mondo, celanta problemsolvadon per justa kaj efika komunikado.

Valoroj

Niaj valoroj spegulu la plej altajn universalajn aspirojn de la homaro: Amo, Vero, Justeco, Libereco, Unueco, Toleremo, Respondeco, Respekto al la vivo; kaj kunlaboradon kun ĉiuj progresemaĵoj, bonintencaj asocioj kaj individuoj strebantaj por tiujn apliki en homaj rilatoj.

Niaj strategiaj kolonoj – KIRI

Plej multaj el la jenaj proponoj estas jam iniciatitaj.

1. Kunlaborado

Ni faciligu kunlaboradon inter esperantistoj per la jenaj rimedoj:

- Modernigita retejo por aŭtomatigi administrajn kaj financajn procedurojn, faciligi servojn al la membroj per provizo de necesaj kontaktoj, materialoj, mendiloj, aliĝiloj, membrecorenovigoj.
- Trijara Almanako reta kaj presita por kunigi ĉiujn necesajn informojn pri la Asocio, ĝiaj Landaj Asocioj kaj reprezentantoj, kunlaborantaj partneroj, agadraportoj, estontaj planoj.
- Trejni laŭbezone por pli efika laboro (konfliktsolvado, konsilejo: mediaciado? ombudsmano?).
- Doni pli da subteno al Landaj Asocioj kaj kuraĝigi al pli da interesocia kunagado.
- Krei komisionojn portempajn kaj longdaŭrajn por atingi difinitajn celojn.
- Atentigadi pri la neceso kunlaborigi malsamcelajn individuojn por realigi komunajn projektojn.

2. Informado kaj komunikado

- Organizi sub la gvido de komisiito de UEA laborgrupojn kun grupestroj kaj membroj dediĉitaj al la antaŭenigo de la diversaj flankoj de informado: retejo esperanto.net; utiligo de eventoj kiel kongresoj por diskonigi Esperanton (gvidilo, trejnado); amaskomunikiloj (trejnado por kontaktoj kaj intervjuoj, preparo de materialoj); sociaj retoj (oportuneco de agado, komunikado); respondoj al kritikoj kaj misprezentoj (help-dokumento, reaga teamo); kontaktoj al opinigvidantoj (politikistoj, ĵurnalistoj, edukistoj); konstanta fluo de bultenoj aŭ gazetaraj komunikoj kiuj celu eksterajn informfontojn, ne nur la internajn de UEA.
- Plifortigo de interna komunikado de UEA al membroj kaj partneraj asocioj.

3. Rilatoj kun la ekstera mondo

- Daŭrigi subtenon de oficejoj kaj agado ĉe UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.
- Subteni CED kaj ESF en la daŭra organizado de konferencoj, simpozioj, seminarioj kiuj helpas al niaj partneroj atentigi pri lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio, solvoj por komunikaj problemoj.
- Kuraĝigi esperantistojn al aktiva engaĝiĝo kun lokaj asocioj havantaj mondan perspektivon.
- Organiziĝi kaj prepariĝi por peti agnoskon de Esperanto (Esperanto-tago, asembleoj de UN,

Unesko, kaj iliaj neregistaraj organizaĵoj [NROj], parlamentoj).

– Diskonigi kaj kuraĝigi al partopreno esperantistajn kaj interesantajn esploristojn en konferencoj, eldonprojektoj.

– Proponi al aliaj asocioj servojn kiujn ni kapablas liveri per niaj transnaciaj kontaktoj.

4. Instruado

– Kunlabori kun ILEI por helpi realigi ĝiajn celojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj.

– Subteni la laboron de edukado. net kaj la KER-ekzamenoj por kvalifiki instruistojn.

– Kuraĝigi al subvencipetado por helpi lernejojn kaj edukajn instancojn atingi siajn celojn uzante Esperanton kiel instrumenton por transnacia interkompreniĝo.

– Subteni projektojn kiel la 30 Oraj Horoj kaj la Multlingva Akcelilo por progresi al organizitaj internaciaj eksperimentoj pri la valoro de Esperanto kiel eduka instrumento, faciliganta lingvolernadon kaj transkulturan interkomprenon inter samaĝaj lernejoj.

Fonto: Esperanto, Junio 2024, p. 127

Leposlovni kотиček

Beletra angulo

Evropska himna

Ĉe greste na spletiŝče EEU, boste verjetno precej razočarani. Obvestilo na domaĉi strani, da spletiŝče ni aĝurirano, vas usmeri na nadomestno stran <https://europo.be/eo/pri-europa-esperanto-unio/>, ki je sicer živa, pa tudi kar pomanjkljiva. Vseeno vsebuje nekaj koristnih informacij: statut EEU, povezavo na gradivo za MLA (za francosko govoreĉe) in evropsko himno v esperantu, v mnogih evropskih jezikiĥ (tudi prevod v slovenŝĉino), note in zvoĉni posnetek zapete himne.

Eŭropa Himno

Muziko: Ludwig van Beethoven

Esperanta teksto: Umberto Broccatelli

*Kantu kune amikaro,
ni la ĝojon festas nun,
nek rivero, nek montaro
plu landlimoj estas nun.*

*Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid';
nun brilegu belo via,
ĉiu estas via id'.*

*Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.*

*De l' Malnova Kontinento
ĝus ekstaris la popol',
gvidas ĝin tre nova sento
kaj kuniga forta vol'.*

*Sub la ŝildo de la juro
ni vivados en konkord'.
Tio estas nia ĵuro:
unu land' kaj unu sort'.*

*Jen ekzemplo por la mondo:
jen direkto, jen la voj':
tuthomara granda rondo
en la paco, en la ĝoj'!*

Slovenski prevod neuradnega esperantskega besedila evropske himne je v to zbirko prispeval Tomaž Longyka:

*Hej, prijat'i, vkup zapojmo,
praznik je veselja zdaj,
niso reke ne gorovja
meje veĉ kakor nekdaĵ.*

*O, Evropa, dom naŝ dragi,
bil je dolg delitve boj,
naj blesti lepota tvoja,
vsak od nas otrok je tvoj.*

*Prapor tvoj ljudi združuje,
minil je vojni ĉas.
Zakon tvoj za drĝavlĵane
slope je, soĝitja kvas.*

*Vstalo na Celine Stari
ljudstvo za prihodnji vek,
združevalna moĉ ga vodi
in nenehno spravlĵa v tek.*

*Pod okriljem prava bomo
mir uĝivali poslej,
v eni barki, z eno usodo
druĝno plovemo naprej.*

*Tu imamo pot in smer in
zgled za naŝ vesoljni svet:
zemeljska druĝina v miru
hoĉe, v radosti ŵivet'!*

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

Spletni izpiti KER 2024

Junijaska objava na edukado.net/novajoj o letošnjih opravljenih 53 spletnih izpiti KER na več ravneh od B1 do C1 je opremljena tudi s preglednico po državah uspešnih kandidatov in zaslonsko sliko ene od video-konferenc. Pri Sloveniji članek navaja dva uspešna izpita in sicer B2K in C1K, ki ju je opravil Thomas Kobilšek iz Ljubljane. G. Kobilška lahko tudi vidimo v njegovi delovni in dnevni sobi na objavljeni sliki z izpita C1 dne 1. junija 2024. Sicer pa je Thomas pravi poliglot (obvlada 11 jezikov) in mu je pouk in učenje tujih jezikov poklic in veselje. Z esperantom se je seznanil na poliglotski konferenci v Ljubljani leta 2018. Naj vas še opozorim na novico iz 3. lanske številke našega glasila, kjer smo prvič poročali o njegovem uspešnem polaganju izpita B1K na Svetovnem kongresu v Torinu. **O.K.**

Udeležba na skupščini EEU 2024 v Strasbourgu

Kot delegat ZES pri Evropski esperantski uniji (EEU) se udeležujem letnih skupščin, kadar je to le mogoče. Letos je EEU izkoristila priložnost za izvedbo letne skupščine v okviru Evropskega esperantskega kongresa od 8. do 12. maja v Strasbourgu. Ker se tega kongresa osebno nisem mogel udeležiti, sem prosil organizatorje letne skupščine EEU, da bi ta potekala hibridno. Najprej so mi odgovorili, da niso na razpolago ustrezne tehnične možnosti, potem pa so le nekako v lastni režiji zagotovili spremljanje na daleč s pomočjo Zoom video-konference. Skupščina EEU je potekala 9. maja od 9.15 do 10.45. Sekretar EEU Luigi Fraccaroli je skrbno obračal kamero in mikrofona na svojem računalniku, tako da se je dalo videti govorce in slišati povedano. Svoje glasovanje, pripombe in vprašanja pa smo lahko sproti posredovali pisno.

Udeležba na skupščini je bila skromna. V univerzitetni predavalnici je bilo osem delegatov, dva pa sva sodelovala po spletu. Ali je bilo to dovolj za sklepčnost, še ne vem, ker še čakam na zapisnik. Upoštevati moramo, da imajo glasovalno pravico le

tiste države, ki imajo poravnano članrino v EEU. Slovenija v tem pogledu ni problem.

Vsebinsko pa skupščina ni bila slaba. Zanimivo je bilo zlasti poročilo vodstva EEU o preteklem delu in načrtu dela za naslednje obdobje. Ne da bi bile navedene vse podrobne naloge predstavlja poročilo ključne dosežke in najbolj pomembne cilje nadaljnega delovanja EEU. Poročilo navajam spodaj v celoti.

Moje osebne želje in pripombe glede delovanja EEU pa se nanašajo na potrebo po ažuriranju spletišča EEU in objavi zapisnikov organov EEU ali v biltenu ali na spletišču. **O.K.**



EEU-atingoj dum la pasinta jaro – raporto de la Sekretario/Prezidanto

Karaj geamikoj, ni ne volas enuigi vin per longa listo de niaj agadoj, kiel la 3 prelegoj de nia Prezidanto al la Irana Esperanto-Asocio, lia prelego organizita de la Hinda Ambasadoro en Irlando, aŭ lia parolado al la Londona Esperanto-Klubo. Sufiĉas diri, ke EEU konstante aktivas. Mi do limigos min priskribi du atingojn de aparta graveco.

Konferenco pri la Estonto de Eŭropo.

En la lastaj jaroj EEU perdis tre valorajn kaj laboremajn membrojn. Ni mencias precipe **Zlatko Tišljar**, nia iama sekretario, kiu senĉese laboris por Esperanto kaj lingva justeco dum sia tuta vivo, kaj **Klaus Leith**, kiu ludis ŝlosilan rolon en nia elstara sukceso dum la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo.

Kaj nia sukceso ja estis elstara. La propono de EEU pri la uzo de la **Multlingva Akcelilo** por plibonigi



lingvolernadon ĝenerale («*La EU bezonas plibonigitan lingvolernadon*») estis la plej populara propono en la kultura kaj eduka areo. Ni memoru, ke estis entute pli ol 17 000 proponoj al la

Konferenco! Do, aparte malfacilis atingi la plej grandan popularecon - sed EEU sukcesis. Ni dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj kontribuis al tiu ĉi sukceso. Normale ni ne menciis nomojn, sed du personoj ludis ŝlosilan rolon: la forpasinta **Klaus Leith**, kiu mortis komence de 2022, kaj **István Szabolcs**, kiu estis ege aktiva en Hungario.

Kiel vi scias, estas grandega antaŭjuĝo kaj manko de scio pri Esperanto inter EU-oficistoj. Pro tio, la fina raporto de la Konferenco anstataŭigis la referencon al Esperanto per malsaĝa propono, ke ĉiuj infanoj en la 27 EU-landoj lernu la anglan! Por la informo de ĉi tiuj EU-oficistoj, ili jam lernas la anglan!

Estas rimarkinde, ke nia propono, malgraŭ ĝia populareco, estis forbalaita fare de la EU-burokrataro favore al tute superflua rekomendo pri la angla. Feliĉe D-ro Michele Gazzola kaj liaj kolegoj konservis viva la proponon. Ilia raporto en septembro 2022 al la Komitato pri Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento (CULT), titolita *La aliro de Eŭropa Unio al multlingvismo en sia propra komunika politiko*¹ refokusigas atenton pri kelkaj gravaj kampoj por plifortigi plurlingvecon, inkluzive de la MLA. Do, dank'al la laboro de D-ro Gazzola kaj liaj kolegoj, nia MLA-propono nun aperas en oficiala dokumento de la Eŭropa Parlamento. Estos grava tasko por EEU memori tiun ŝlosilan raporton al la novelektita Parlamento post junio ĉi-jare.

Malgraŭ la astronomiaj sumoj elspezitaj por la instruado de la angla dum pluraj generacioj, la **Raporto Gazzola** substrekas, ke nur 13 % de la plenkreska loĝantaro en EU pensas, ke ili tre bone regas ĉi tiun lingvon. **Ne ekzistas do komuna lingvo en EU, kiu estas parolata je tre bona nivelo de la plimulto de la loĝantaro.** EU-civitanoj havas naturan rajton kompreni EU-regulojn kaj regularojn kiuj influas iliajn vivojn, kaj tio igas multlingvismon *conditio sine qua non* de demokratio. La lingvaj sekvoj de Brexit aldoniĝas al la komplekseco.

En ĉiam pli tutmondigita mondo, la bezono de komunikado je planeda skalo estis nuntempe

plenigata de la ĉiea angla. Ĉi tio ŝajnas problema en multaj rilatoj.

- Unue, oni permesis ĝin okazi sen ia scienca konsidero de ĝiaj eblaj sekvoj por aliaj lingvoj.
- Due, la nekontrolata disvastigo de la angla estas kreskanta minaco al lingva diverseco.
- Trie, ĝi donas nemerititan kaj dumvivan avantaĝon al la 6% de la homaro, kiuj estas denaskaj parolantoj de la angla.
- Kvare, nur tiuj kun aparta talento por lerni lingvojn, aŭ la monon por pasigi jarojn en anglalingvaj landoj, povas esperi regi la lingvon. Luj do povas praveble vidi la disvastiĝon de la angla kiel hierarkia kaj nedemokratia.
- Kvine, la tempo kaj fortostreĉo necesaj por regi la kompleksecon de la angla lasas al la meza studento malpli da tempo por studi aliajn lingvojn.
- Sese, la kreskanta uzo de nur la angla ene de la EU-institucioj riskas igi eŭropan integriĝon pli malproksima de eŭropaj civitanoj – post Brexit nur 1% havas la anglan kiel gepatran lingvon.
- Fine, la sola komparo de atingo en lingvolernado en pluraj EU-landoj per objektiva testado, **SurveyLang** de la Eŭropa Komisiono de 2012, **estis farita nur ĝis la B2-nivelo** – ĉar **tiuj, kiuj atingas C1-nivelon**, eĉ en sia unua fremda lingvo, **estas proksimume nur 1%**.

Komence la angla aspektas facile lernebla, kaj tiu trompigas multajn homojn. Kvankam ĝi estas malpli fleksita ol multaj lingvoj, kaj ne havas la kompleksan tonsistemon de la ĉina, ĝi havas siajn proprajn malfacilaĵojn, kiuj ne bezonas esti skizataj ĉi tie. La internacia dominado de iu ajn nacia lingvo estas esence maljusta. La angla estas kiel ruĝa rozo, bela floro, sed kiom da ni ŝatus havi ĝardenon plena de ruĝaj rozoj, sen iu ajn alia floro?

Notindas, ke Esperanto estas pli vaste uzata ol multaj pensas. Por doni nur unu ekzemplon: la Esperanta Vikipedio nun enhavas 340 000 artikolojn, pli ol 11 el la 24 oficialaj lingvoj de EU.

¹ La studo estas elŝutebla ĉe: [The European Union's approach to multilingualism in its own communication policy | European Parliament \(europa.eu\)](https://www.europarl.europa.eu/media/infocentre/press_corner.do?cid=1234567890)

Kompare, la irlanda havas 59 000 artikolojn, la latina havas 138 000 kaj la malta havas nur 5 500.

Ĉiu ebla rolo de Esperanto en EU devas plifortigi la rajton de ĉiu EU-civitano komuniki kun la EU-institucioj en sia propra lingvo - egalaj lingvaj rajtoj por ĉiuj. Do, dominado de iu ajn nacia lingvo en la EU konfliktas kun egalaj lingvaj rajtoj por ĉiuj, kaj estas laŭ sia naturo diskriminacia. Ideala situacio, kvankam tre malfacile realigebla, estus permesi al ĉiuj paroli en sia gepatra lingvo, kun interpretado nur en neŭtralan lingvon kiel Esperanto. Tio ege plibonigus la kvaliton de komunikado, kaj permesus grandan pliigon de la nombro da oficialaj lingvoj, **sen plialtiĝo de kostoj**. Oni povus uzi lingvojn kiel la kataluna, la okcitana, la sicilia aŭ la sarda, same kiel la lingvoj de enmigrintoj, kiel la araba, la turka kaj la kurda. Neniuj interpretistoj aŭ tradukistoj perdis sian laboron, sed estus retrejnataj por alfronti novan situacion de **pli justa plurlingveco**, bazita sur egalaj lingvaj rajtoj por ĉiuj.

Mi nun ĝojas povi prezenti profesorinon Alice Leal de la Universitato de Witwatersrand, Johanesburgo, kun kiu mi havis la honoron kaj plezuron verki la libron, kiun ŝi nun prezentos al vi.

Malgraŭ la profundaj antaŭjuĝoj, EEU sukcesis atentigi la EU-n pri Esperanto. La Eŭropa Parlamento estis reprezentata ĉe la Konferenco fare de 109 EP-anoj el ĉiuj 27 membroŝtatoj. Nia prezidanto skribis al ĉiuj 109 EP-anoj en 8 diversaj okazoj. Do, ili ricevis preskaŭ 900 mesaĝojn substrekante kiel Esperanto povus plibonigi lingvolernadon.

La antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto estas la plej granda problemo. Kvankam plej multaj homoj lernis iomete la anglan, la reala nivelo atingita estas tre seniluziiga. La sola objektiva studo bazita sur realaj ekzamenoj en multaj EU-landoj, organizita de la EU-Komisiono, **SurveyLang** en 2012, montris, **ke nur 1% de studentoj atingas la C1-nivelon, eĉ en sia unua fremda lingvo**. Ĉi tio signifas, ke 99% de EU-civitanoj estas en konstanta malavantaĝo kiam ili traktas kun denaskaj anglalingvanoj. **Tio estas maljusta, kaj unu el niaj ĉefaj taskoj estas daŭri montri tiun maljustecon, kaj proponi pli justan solvon.**

Aparte gravas unue montri ke ekzistas problemo. La propagandistoj senĉese ripetadas, ke «ĉiuj parolas angle». Tro multaj homoj kredas la propagandon, kaj do tute ne vidas problemon. Tio

signifas ke, por multaj, Esperantistoj venas kun solvo al neekzistanta «problemo». La propagando ke «ĉiuj parolas angle» absolute malveras. Konkreta ekzemplo: Mia edzino **Natalie**, kiu estas francino, provis uzi nur la anglan dum 5 jaroj en Vieno, kaj nun dum 1 jaro en Varsovio. Ŝi ja trovas kelkajn homojn, kiuj iomete scipovas la anglan, sed la kvalito de la komunikado estas mizera, kaj plejofte tute ne okazas komunikado.

Tamen ni ankaŭ devas pensi kaj agi strategie. Kiam ni proponas gravan rolon por Esperanto en mondo, kiu estis cerbolavita de anglalingvaj propagandistoj dum jarcento, la normala reago estas malakcepto. La respondo al tiu ĉi problemo estas proponi Esperanton en la kunteksto de multlingveco, kiu restas oficiala EU-politiko. La uzo de mallongaj Esperanto-kursoj kun la celo plibonigi lingvolernadon ĝenerale, la propedeŭtika uzo, tendencas malfermi la pordegojn por Esperanto. Verdire en modesta rolo, sed kiam vulpo sukcesas enigi sian nazon en la kokinejon la resto de ĝia korpo sekvas, iom post iom. La saĝa Zamenhof jam komprenis tion. Li skribis:

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingos la celon en gloro.

Kaj pri Zamenhof la brila hungara poeto Kalacsay skribis:

Ni laŭdu lin, ke audŭ nin homaro surdamuta.

Estontaj Planoj

EEU restas malferma al ĉiuj viaj ideoj pri estonta agado. Ŝajnas al la estraro, ke la plej promesplena vojo estas daŭrigi la MLA, en malsamaj landoj. Tio havas multajn avantaĝojn:

- 1) Ĝi enkondukas Esperanton en ne-minaca maniero.
- 2) Ĝi plibonigas lingvolernadon ĝenerale, precipe ĉe la 80% de la loĝantaro, kies talentoj kuŝas aliloke ol en lingvolernado.
- 3) Ĝi tre efike kontraŭas la antaŭjuĝon, ke Esperanto volas anstataŭigi ĉiujn aliajn lingvojn.
- 4) Ni kontaktos la novan Kulturaran Komitaton de la Eŭropa Parlamento tuj kiam ĝi estos konstituita, por konsciigi ilin pri la Raporto Gazzola kaj ĝia rekomendo de nia MLA por plua agado.
- 5) EEU pliigos siajn kontaktojn kun ILEI cele trovi lernejojn en kelkaj EU-landoj por efektiviĝi la MLA sur pli granda skalo.

Ni devas senĉese ripeti, ke ni favoras plurlingvecon, kaj ke la **vera minaco al plurlingveco venas de la senbrida kresko de la uzo de la angla, ne de Esperanto.**

Aldone, de centra graveco estas certigi oficialan agnoskon de landoj de Esperanto kiel "**parto de sia kultura heredaĵo**", tiel oficiale agnoski Esperanton kiel "lingvo de kulturo". Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) oficiale agnoskis Esperanton "kiel parto de sia nacia kultura heredaĵo, kaj de la kultura heredaĵo de Eŭropo". EEU kaj ĉiuj ĝiaj landaj asocioj devas intensigi laboron por ke pliaj EU-Membro-Ŝtatoj donu oficialan agnoskon al Esperanto kiel parto de sia kultura heredaĵo. Landoj esperplenaj por tia rekono inkluzivas Aŭstrion (Esperanto-Muzeo en Vieno, financita de la aŭstra ŝtato, kaj eksprezidanto de Aŭstrio Franz Jonas, flua parolanto de Esperanto); Hungario (brila literatura produktado en Esperanto, inkluzive de Kalman Kalocsay kaj Julio Baghy); Litovio (tre forta Esperanto-movado kun bonaj politikaj ligoj), Italio (intereso esprimita de Itala Esperanto-Asocio), kaj aliaj.

Progresanta MLA, kaj progresanta oficiala nacia rekono de Esperanto kiel parto de la kultura heredaĵo, estas inter la plej gravaj temoj diskutendaj de ni.

Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos fine de septembro 2024, ni antaŭvidas raportojn pri la someraj aranĝoj en Esperantujo, kongresoj ktp. Krome el nia agado:

- Esperanto-Tago en Ljubljano
- nova estraro de SIEL
- novaj eldonaĵoj
- katalogo de la arĥivo de SIEL
- historiaĵoj de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj

rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...

Fejsbuka paĝo *Ŝercoj en Esperanto*

Publikigo de Claudio Tadeu Cavalotte



Du el la komentoj:

Paula Aduriz: Ĉar "dioto" venas el "dio", "di-oto" estas ja homo, kiun oni submetos al procezo de dieco!

Yukihiko Doi: iDo

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Grabloviĉeva 28, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoj Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>